بعد از ده روز زامنهوف موافقت خود را اعلام کرد. اما در آخر وقتی خیابان با نام زامنهوف افتتاح گردید هیچ‌کجا در بایگانی Limoges سندی پیدا نشد. ارگان وقت اسپرانتو فرانسه البته گزارش‌هایی در باب فعالیت‌های گسترده اعضا گروه جهت برگزاری جشن، کنسرت، سخنرانی و کلاس در Limoges در سال ۱۹۰۷ ارائه می‌کند. اما اشاره‌ای نسبت به نام گذاری خیابان نمی‌نماید. Raymond Gueguen به سند باارزشی در میان اسناد بایگانی‌ها دست یافت. آن ثابت می‌کند، که فقط در دسامبر ۱۹۱۲ بالاخره سند "Rue Zamenhof" (خیابان زامنهوف) در بین صورت جلسات باشگاه اسپرانتو Limoges پیدا می‌شود: ۱۷ دسامبر ۱۹۱۲ اعضای باشگاه دیداری داشته و صورت جلسه‌ای به زبان فرانسه در " دفتر گزارشات" تنظیم کردند. ما یادداشتی دست‌نویس پیدا کردیم: *"ریاست باشگاه آقای دوریس به نمایندگی از گروه به آقای ژانوت هم‌آرمان دوست‌داشتنی ما که خیابانی را به نام خالق اسپرانتو نام‌گذاری کرد تبریک می‌گوید. وی باعث شد ما اکنون در Limoges خیابانی به‌نام زامنهوف داشته باشیم"*، ترجمه تحت الفظی به فرانسه:

"... que à Limoges nous avons maintenant la Rue Zamenhof".

فهرست رسمی درباره خیابان‌ها در Limoges از سال ۱۹۱۳ در حقیقت در صفحه‌ی ۱۳۰۰ آن موجود است. بدیهی است که افتتاح این خیابان قبل از ۱۷ دسامبر ۱۹۱۲ است، اما احتمالا بعد از ژولای،

یعنی بعد از افتتاحیه میدان در Terrassa و خیابان در Sabadell، چون در سپتامبر ۱۹۱۲ سازمان جهانی اسپرانتو در مجله رسمی سازمان خویش "مجله اسپرانتو" رسما به مردم این موارد را اعلام و چاپ نمود. اگر این خبر اشتباه می‌بود، مسلما به نفع Limoge نبوده و آن گروه حتما خواستار تصحیح آن اشتباه می‌شدند.

روشن است که تا سال‌های بسیاری پیشنهاد خیابان زامنهوف در Limoge مورد بحث و بررسی جدی قرار نگرفته بود. در ماه می ۱۹۱۲ Leon Berland، دبیر عمومی انجمن Limoge به عنوان یکی از اعضاءِ هیات رئیسه شهرداری انتخاب شد. ۵ سال قبل خودش ایده‌ی خیابان زامنهوف را مطرح کرد، احتمالا فکر او زمانی به واقعیت پیوست که به عضویت هیات رییسه شهردار درآمد. اما یک معما باقی می‌ماند، که چرا در گزارش انجمن در ۱۷ دسامبر ۱۹۱۲ نامی از آقای برلند در ارتباط با "Rue Zamenhof" برده نشده است.

خلاصه، برای شهر Limoge قطعا قابل تقدیر است که در سال ۱۹۰۷ اسپرانتیستی درست بیست سال بعد از چاپ "کتاب اول" (اولین کتاب آموزش اسپرانتو) ایده‌ای برای نامیدن خیابانی به اسم خالق زبان بین‌المللی و مولف آن زامنهوف داشته است.

با این وصف اولین افتخار برای زامنهوف در نامیدن خیابان یا میدانی به نام او در جای دیگری اتفاق افتاد، یعنی ۲۹ ژوئن ۱۹۱۲ در شهر کاتالونیایی Terrassa، وقتی که میدان Zaragoza در آن زمان نام جدیدی با عنوان "زامنهوف" به خود اختصاص داد.



خیابانی که طولانی‌ترین عمر را بدون هیچ وقفه زمانی داشته و نام زامنهوف را بر خود حفظ کرده است.
افتتاحیه ۱۹۱۲، Limoges، فرانسه



بنای یادبود در محوطه مجاور خیابان
Deribasovskaja 3، ادسا، اوکراین



تابلوی مدرسه اسپرانتو در هاوانا، کوبا



خیابان زامنهوف (افتتاح: ۱۹۵۹) و تابلو (دسامبر ۱۹۶۱)، مجارستان. ترجمه متن روی تابلو: "به یاد مبارز برجسته صلح و دوستی میان ـ مردمی دکتر زامنهوف لایوس، پزشک لهستانی، (۱۹۱۷ ـ ۱۸۵۹)، خالق زبان بین‌المللی اسپرانتو"



"یک خدا، یک جهان، یک زبان ارتباطی" ـ فرازی از انجمن مذهبی اسپرانتودانان ژاپن بر روی سنگ یادبود این انجمن در Kameoka



پرده‌برداری از تابلوی خیابان در Villarodona، اسپانیا



این خانه زمانی به خانواده زیبرنیک تعلق داشت که زوج جوان زامنهوف در آن اقامت داشتند، و آدرس آن حالا خیابان "زامنهوف ۵، کانوس" است. پس از ۱۹۹۳ این خانه مرکز انجمن اسپرانتو لیتوانی است.

IRANA ESPERANTISTO

IREA
Irana Esperanto-Asocio

Kultura sezon-revuo en la persa kaj Esperanto N-ro: 5, Dua serio, Printempo 2013

Monda tago de akvo

Voĉlega programo ankaŭ por Esperanto

Floroj el florejo (Golestan) de Sadio

Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko

Internacia Verko : “Kjeŭ”

E@I lanĉis prikomputilan blogon

Pajam-e Sabzandiŝan (*Mesaĝo de Verdpensuloj*)
ISSN 1728-6174

IRANA ESPERANTISTO estas kultura kaj sendependa sezon-revuo internacia.



Kovrilo:



Persa kovrilo:



Grafikaĵo k enpaĝigo: Sabzandiŝan

Adresoj: Tehran, Iran
TTT-ejo : www.espero.ir
Retpoŝto: info@espero.ir


Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuaĵoj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj kontribuaĵoj ĉu en Esperanto ĉu en la persa.

Enhavo:

La persa parto:

Monda Tago de Akvo

Paiva Netto*



Artikolo aperinta en centoj da gazetoj, revuoj kaj retejoj en Brazilo kaj en la mondo, je marto 2010.

Je la 22-a de marto 1992, Unuiĝintaj Nacioj ekdisvastigis "Universalan Deklaracion pri Rajtoj de Akvo". La intenco de tiu teksto estis interesigi kaj ekologie konsciigi loĝantarojn kaj ties registarojn, precipe koncerne la gravecon de akvo por homa postvivado. En la sekvinta jaro, je tiu sama dato, la Ĝenerala Asembleo de U.N. deklaris, ke la 22-a de marto estas Monda Tago de Akvo.

De tiu tempo, popoloj pli kaj pli maltrankviliĝadas pro manko de akvorimedoj. Iuj analizistoj antaŭvidas en ne tre fora estonteco militkonfliktojn, surbaze de konkurado por tiu altvalora likvaĵo.

MILITO PRO AKVO

Artikolo verkita de usona profesoro pri Ekonomiko Jeffrey D. Sachs, kiun oni publikigis en la ĵurnalo Valor Econômico, en aprilo 2009, estas unu plia konfirmo, ke bedaŭrinde tiu antaŭvidaĵo jam realiĝas: "Multajn konfliktojn kaŭzas aŭ bruligas manko de akvo. Konfliktoj – de Ĉado al Darfuro, en Sudano, de la dezerto Ogaden, en Etiopujo, al Somalio kaj tieaj piratoj, same kiel en Jemeno, Irako, Pakistano kaj Afganujo – okazadas sur granda regiono de sekaj landoj, kie manko de akvo kaŭzadas kolapson de rikoltoj, morton de brutaroj, ekstreman malriĉecon kaj malesperon."

Kaj la artikolisto raportas: "Unesko, organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, publikigis antaŭ nelonge Raporton pri Akvoprizorgado en 2009; la Monda Banko disvastigis profundan studon pri Hindujo (Hinda Akvoekonomio: preparado por tumulta estonteco) kaj pri Pakistano (Pakistana Akvoekonomio: pligravigo de malsekeco); kaj Asia Society disvastigis ĝeneralan analizon pri aziaj akvokrizoj (La plej proksima azia defio: garantii akvoestontecon en tiu regiono)".

Vidu la situacion, al kiu ni alvenis. Urĝas haltigi tion. Sachs asertas, ke "tiuj raportoj enhavas similajn historiojn. La liverado de akvo estas ĉiam pli nesufiĉa en vastaj regionoj de la mondo, precipe en ĝiaj sekaj regionoj. La rapida pligraviĝo de akvomanko respegulas kreskadon de la loĝantaro, elĉerpiĝon de subtera akvo, malŝparadon, malpurigadon kaj grandegajn, pli kaj pli katastrofajn rezultojn je klimatŝanĝoj pro homa agado. La sekvoj estas doloraj: sekeco kaj malsato, forperdo de kondiĉoj por postvivado, disvastiĝado de malsanoj transdonataj per akvo, deviga migrado kaj eĉ militaj konfliktoj".

Kion fari antaŭ tia apokalipsa scenaro? La profesoro mem finas: "*Praktikaj solvoj inkluzivas multajn elementojn, interalie pli bonan administradon de akvorimedoj, teknologiojn pli evoluintajn por pligrandigi*

la efikecon en uzado de akvo kaj novajn investojn kune entreprenatajn fare de registaroj, fare de sektoro de entreprenistoj kaj fare de civilaj organismoj".

SENKONTROLAJ SENTOJ

Sed laŭ la sinsekvo de tagoj, tia problemo nepre kreskos, se oni ne starigos vere efikajn decidojn, kiujn oni ofte prokrastas. Eĉ en lokoj, kie tiu altvalora likvaĵo estas malabunda, homoj malrespektas tiun naturan elementon, sen kiu oni ne povas postvivi. Kiam homo havas senkontrolajn sentojn, tiam ĉio ĉirkaŭe kontaĝiĝas.

ALIREBLECO AL TRINKEBLA AKVO

Raporto de Luana Lourenço, el Agentejo Brasil, publikigita dum 2010j, informas al ni, ke *"la mondo devos atingi la Celon de la Jarmilo redukti je duono la nombron da homoj sen alirebleco al trinkebla akvo. Kvin jarojn antaŭ la tempolimo por tiu celo, kiu estas 2015, 87 procentoj el la monda loĝantaro disponas pri fontoj por liverado de trinkebla akvo, laŭ raporto hodiaŭ disdonita [je la 15-a de marto 2010], fare de Monda San-Organizo (MSO) kaj de Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por la Infanaro (Unicef). Malgraŭ la progreso rilate la alireblecon al trinkebla akvo, ciferoj pri salubrigo ankoraŭ estas malbonaj. Pli ol 2,6 miliardoj da homoj – 39 procentoj el la tutmonda loĝantaro – plu restas sen tia servo. Laŭ tiu dokumento, tiu problemo ankoraŭ mortigas ĉiujare po 1,5 miliono da infanoj malpli ol 5-jaraĝaj. Infanoj kaj virinoj, laŭ MSO kaj Unicef, estas la plej ofte atingataj de malfacila alirebleco al akvo kaj de manko de salubrigo."*

Ni intencas timegigi neniun. Ni nur emas elstarigi informojn, kiuj postulas tujan sintenon de la surteraj loĝantaroj, nome por respekto al nia kolektiva loĝejo. Jen ni lasas la atentigojn. Ne manku do, flanke de registaroj kaj de la socio, nemalhaveblaj, realĝustigaj decidoj, dum ankoraŭ estas tempo. Se la afero estas malfacila, do ni komencu tuj!

Kiel ĉiam, la Paroloj de Jesuo ŝajnas aktualaj. Kiam oni demandis Lin pri tio, kiel kondutos homoj kiam alproksimiĝos tempo de granda afliktiĝo, sciigitaj ekde la Malnova Testamento de la Sankta Biblio, tiam Li respondis, ke same kiel en la tempo de Noa kaj Lot, neglekto estos pli granda ol zorgoj postulataj de la seriozeco de la faktoj (Evangelio de Luko, 17:26 ĝis 30). Ne necesas kredi pri "tiaj aferoj religiecaj" por percepti, ke fortkolora bildo desegniĝas.

***José de Paiva Netto**, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Komentoj

Han Zuwu - Ĉinio/ Homaro ne povos vivi en la mondo, se mankos al la mondo eĉ unu guto da akvo! Ni devas karigi la akvon! Bondezirojn al vi ĉiuj!

Stanislavo - Germanio/ Jes, la akvo estas fudamento de la tuta vivo kaj nur kiam ĝi mankas, ni konstatas, ke ĝi estas pli valora ol oro! Tiuj kiuj ĝin sufiĉe havas ne taksas kaj multaj ekzemple en Afriko mortas pro manko de sufiĉa trinkebla akvo. Kun amika saluto Stanislavo.

Jurij Kivaev - Rusio/ La artikolo "Monda Tago de Akvo", kies aŭtoro estas estimata S-ro José


Paivo Netto estas tre aktuala. Mi, kiel prezidanto de loka Esperanta grupo, baldaŭ priparolos la problemon kun la samgrupanoj. Certe ni scias, ke la problemo ne estas nova: prognozistoj asertas, ke sensala (dolĉa) akvo sur la Tero povos ĉesi al 2033j. Laŭ onidiro en Rusio 35 – 60% de trinkebla akvo ne kontentigas al sanitariaj normoj. Tamen estas komplikaĵoj, ligitaj kun trasportado de trinkebla akvo ĝis la konsumanto pro eluzita stato de akvoduktoj en multaj urboj de la lando. Koran dankon al LBV pro akra vidado de la problemo kaj klopodo plibonigi la staton. Amike Jurij.

Saeed Ahmad Farani - Pakistano/ "Akvo estas Vivo, sen ĝi ia ajn vivoformo fariĝas neebla. Malpurigi ĝin estas krimo kontraŭ la Homaro." Ege bela kaj vera mesaĝo... Mi diskonigos la artikolon de José de Paiva Netto al miaj amikoj kaj ankaŭ sendos ĝin al revuoj. Granda laboro. Vere, homaro devas lervi respekti la naturon.

Ding Ji - Ĉinio/ Ni tute subtenas vian alvokon, kaj opinias, ke estroj de registaroj en Rio 20 necese, aktuale akceptas vian alvokon [...]. Nur ni solidarece batalas unuiĝe al reakciaj agadoj, eblas vereefike sukcesi je Bona Volo. Alvoko estas propagando de por popola konscio prava, post kio ni nepre longtempe batlas sencxese. Ni, do, devus konstante organiziĝi por sukcesa Bona Volo, ne nur estas en Brazilo.

Alicja Lewanderska-quednau - Germanio/ Oni bone scias, ke sen pura akvo kaj aero ne povas ekzisti vivo. Estaĵoj bezonas precipe akvon kaj aeron. Ofte sciencistoj sendas al la publiko kaj al politikistoj apelojn por protekti ilin. En landoj, kie mankas akvo, la vivo de homo estas malfacila. En eŭropaj landoj ĝenerale ne estas manko de akvo, sed estas problemoj pri ĝia pureco. En niaj montaroj oni kutime sen timo kaj problemo povas trinki akvon rekte de fonto, kaj ĝi absolute alie gustas. Akvo estas fonto de sano, kaj malbona akvo estas fonto de malsano. Kiam homo naĝas en freŝa sana akvo ne nur purigadas sin, sed ankaŭ freŝiĝas kaj saniĝas. Akvo estas la rekta kaj mirakla donaco de Dio. Ni faru ĉion por pretekti ĝin.

Voĉlega programo ankaŭ por Esperanto



Jen eta revolucia programeto per kiu eblas aŭskulti skribitan tekston en Esperanto. Legu sube kaj gluu ekzemple la unuan frazon en la programo (elektante unue Esperanto anstatau la lingvon kiun vi vidas unue). Mi provis kaj estis ravita pri la rezulto jam !!! Amuza ĉu ? Pludiru al viaj gekonatuloj.

La komputila teknologio evoluas tre rapide ankaŭ en lingva tereno. Inter similaj aliaj projektoj, jen aperis programo, kiu kapablas laŭtlegi skribitan tekston en 32 lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto.

Kvalito de prononcado ankoraŭ varias ĉe diversaj lingvoj. La Esperanta versio estas ankoraŭ mankohava, sed ekzemple la hungara estas surprize tre bona, normale uzebla.

Senpaga test-versio de tiu ĉi voĉlega programo estas provebla **ĉe: http://www.oddcast.com/home/demos/tts/tts_example.php?var=1**

Ĉe pluraj lingvoj oni povas elekti inter la paroluloj, oni povas elekti ĉu parolu viro aŭ virino, kaj oni povas aldoni diversajn efektojn (ekzemple oni povas rapidigi aŭ malrapidigi la parolfluon).

La programo estas vere impresiga, kaj instigas pensi pri baldaŭa estonto de lingva situacio: 1. voĉ-rekonaj/skribaj programoj, 2. maŝina tradukado, 3. tekstolegaj programoj -- por ĉiu laŭ sia gepatra lingvo...

Szilvási László

Floroj el "La Florejo" (Golestan) de Sadio



Elektis kaj tradukis: D-ro Keyhan Sayadpour

De antikvaj tempoj, estis granda debato pri la roloj de genetiko kaj edukado al homa karaktero. Majstro Sadio (1184-1283?) forte kredis al elstara rolo de genetiko. La jena rakonto bone montras tion. Kelkajn versojn de la rakonto uzas irananoj kiel proverbojn (Kiel: eduko por fipopolo similas al pilk' sur kupolo; lupid' fine iĝas lupo eĉ kreskinte kun hom-grupo). Ĝuu legi ĝin.

Sur monto sidis arabaj rabistaranoj kaj fermis la trairejon de l' karavanoj, pro iliaj minacoj la pasantaj urbanoj devis timi kaj la sultana armeo ne povis ilin limi. Ĉar estis alta rifuĝejo monto-pinta kion la rabistaro estis okupinta. Regnaj konsultistoj rekomendis la neceson malaperigi ilin, ĉar se ili longe persistos, solvo por forpeli ilin ne plu ekzistos.

طایفه‌ی دزدان عرب بر سر کوهی نشسته بودند و منفذ کاروان بسته و رعیت بلدان از مکاید ایشان مرعوب و لشکر سلطان مغلوب. بحکم آنکه ملاذی منیع از قله‌ی کوهی گرفته بودند و ملجاء و ماوای خود ساخته. مدبـران ممالک آن طرف در دفع مضرات ایشان مشاورت همی کردند که اگر این طایفه هم برین نسق روزگاری مداومت نمایند مقاومت ممتنع گردد.

Arbo kiu jam estas juna	درختی که اکنون گرفته است پای
eĉ de vir' ne estas imuna,	به نیروی مـــــردی برآید ز جای
Sed post la pasado de jaroj	و گـــــر همچنان روزگـاری هلی
ĝi ne eltireblos per ĉaroj,	به گردونش از بیـــخ بر نگسلـــی
Fosil' povas esti fonto-ŝtopant',	سر چشمه شایـــد گرفتن به بیل
Nil' ne paseblas per elefant'.	چو پر شـــد نشاید گذشتن به پیل

Finfine estis decidite iujn sendi kaj oportunan okazon atendi, ĝis kiam okazis rabistara atako al grupo kaj la rifuĝejo restis vaka por reĝa trupo. Kelkaj bravaj kaj spertaj batalantoj estis sendataj embuski sur la monto. Vespere revenis la rabistoj, malfortaj kaj pred-portaj. Ili l'armilojn kaj predojn al angulo ĵetis kaj la vestojn demetis. La unua atakinto al ili estis dormo. Kiam pasis okono da nokto:

سخن بر این مقرر شد که یکی به تجسس ایشان برگماشتند و فرصت نگاه داشتند تا وقتی که بر سر قـومـی رانده بودند و مقام خالی مانده، تنی چند مردان واقعه‌دیده‌ی جنگ‌آزموده را بفرستادند تا در شعب جبـل پـنـهـان شدند. شبانگاهی که دزدان باز آمدند سفر کرده و غارت آورده سلاح از تن بگشادند و رخت و غنیمت بـنـهـادنـد، نخستین دشمنی که بر سر ایشان تاختن آورد خواب بود. چندانکه پاسی از شب درگذشت:

Sub la nigron la suno kuŝiĝis,	قرص خورشید در سیاهی شد
En fiŝbuŝon Jona enbuŝiĝis.	یونس اندر دهان ماهــی شد

La brevuloj sin malkaŝis kaj la manojn de l' rabistoj kunligis kaj matene ilin al la kortego alvenigis. La reĝo ordonis ĉiujn ekzekuti. Hazarde estis junulo inter ili kies frukto de la junaĝo ĵus maturiĝis kaj kies herboj de la vizaĝ-herbejo ĵus kulturiĝis. Unu el la ministroj kisis la piedon de l' reĝ-trono kaj metis la vizaĝon de propeto sur la tero kaj diris: "Tiu knabo ankoraŭ ne manĝis frukton el la viv-ĝardeno kaj ne ricevis profiton de la junaĝo. La antaŭvido el viaj moŝtaj pardonemo kaj bonkonduto estas tia ke pardoninte lin vi favoru al mi." Tiu eldiro ne plaĉis al la reĝo kaj koleretinte li diris:

دلاورمردان از کمین بدر جستند و دست یکان بر کتف بستند و بامدادان به درگاه ملک حاضر آوردند. همـه را به کشتن اشارت فرمود. اتفاقا در آن میان جوانی بود میوه‌ی عنفوان شبابش نورسیده و سبزه‌ی گلستـان عـذارش نودمیده. یکی از وزرا پای تخت ملک را بوسه داد و روی شفاعت بر زمین نهاد و گفت: ایـن پسـر هـنـوز از بـاغ زندگانی برنخورده و از ریعان جوانی تمتع نیافته. توقع به کرم و اخلاق خداوندیست که به بخشیدن خون او بربنده منت نهد. ملک روی از این سخن درهم کشید و موافق رای بلندش نیامد و گفت:

"Noblulajn radiojn ne ensorbas fi-popolo	پرتـــو نیکان نگیرد هر که بنیادش بد است
Eduki ilin similas al pilk' sur kupolo"	تربیت نااهل را چـــون گردکان برگنبد است

Ilian figeneracion sentestikigi kaj ilian genton elradikigi estas pli inde ĉar fajron estingi kaj fajreron preterlasi kaj vipuron mortigi kaj vipuridon preterpasi ne estas agoj de saĝuloj.

نسل فساد اینان منقطع کردن اولیتر است و بیخ تبار ایشان برآوردن، که آتش نشاندن و اخگر گذاشتن و افعی کشتن و بچه نگه داشتن کار خردمندان نیست.

Eĉ se pluvas vivo-akvo el nubo	ابـــر اگـــر آب زنـدگـــی بـارد
De salik' vi ne ricevas vinberon	هرگز از شـــاخ بیـد بر نخوری
Ne vivu kune kun malnoblaj homoj	با فـــرومایـــه روزگـــار مبر
De bambus' vi ne ricevas sukeron	کز نی بوریـــا شکـــر نخوری

La ministro aŭdis tion. Li vole nevole akceptis kaj laŭdis la taŭgecon de la reĝa opinio kaj diris: "Tio kion via moŝto, daŭru vi reĝeco, diras estas ja vera ĉar se li edukiĝus vivante inter fiuloj li ricevus ilian naturon kaj iĝus unu el ili, sed mi esperas ke komunikante kun nobluloj li bone edukiĝu kaj ricevu la naturon de saĝuloj ĉar li ankoraŭ junas kaj la kondutoj de kverelo kaj malobeo ne radikis en lia menso kaj estas dirite ke: "Ĉiu ido naskiĝas laŭ unu sama esenco kaj la gepatroj igas lin judo, kristano, aŭ zoroastrano."

وزیر این سخن بشنید. طوعا و کرها بپسندید و بر حسن رای ملک آفرین خواند و گفت: آنچه خداوند، دام ملکه، فرمود عین حقیقت است که اگر در صحبت آن بدان تربیت یافتی طبیعت ایشان گرفتی و یکی از ایشان شدی، اما بنده امیدوار است که در صحبت صالحان تربیت پذیرد و خوی خردمندان گیرد که هنوز طفلست و سیرت بغی و عناد در نهاد او متمکن نشده و در خبرست: کل مولود یولد علی الفطرة فابواه یهودانه او ینصرانه او یمجسانه.

Kun fiuloj amikiĝis Lot-edzin'[1]	با بدان یار گشت همسر لوط
Ŝia profeta aparten' perdiĝis.	خاندان نبوتش گم شد
Mallonge la hundo de kavkompanoj[2]	سگ اصحاب کهف روزی چند
Estis kun bonuloj kaj konvertiĝis.	پی نیکان گرفت و مردم شد

La ministro diris tiel kaj kelkaj proksimuloj de la reĝo kuniĝis kun li ĝis la reĝo nuligis lian ekzekuton kaj diris: "Kvankam mi akceptis pardonon sed ne ties bonon!

این بگفت و طایفه‌ای از ندمای ملک با وی بشفاعت یار شدند تا ملک از سر خون او درگذشت و گفت: بخشیدم اگرچه مصلحت ندیدم.

Pri malamiko diris Zal al Rostam:[3]	دانی که چه گفت زال با رستم گرد
"Konsideru lin febla neniam,	دشمن نتوان حقیر و بیچاره شمرد
Fonteta akvo estas malforta jam,	دیدیم بسی، که آب سرچشمه خرد
Sed en rivero droni povas eĉ lam'."	چون بیشتر آمد شتر و بار ببرد

Ĉiaokaze oni prizorgis la junulon kun kareso kaj komforto kaj metis edukistojn por eduki lin ĝis li lernis bone paroli kaj dece sin kontroli kaj lerte konduti ĉe la reĝo kaj li ŝajnis meritoplena al ĉiuj. Foje la ministro parolis iomete pri liaj ecoj ĉe la reĝo, ke la edukado efikis sur li kaj la malnovan malsaĝon forpelis de lia naturo. La reĝo ridetis kaj diris:

فی‌الجمله پسر را بناز و نعمت برآوردند و استادان به تربیت او نصب کردند تا حسن خطاب و رد جواب و آداب خدمت ملوکش درآموختند و در نظر همگان پسندیده آمد. باری وزیر از شمایل او در حضرات ملک شمه‌ای می‌گفت که تربیت عاقلان در او اثر کرده است و جهل قدیم از جبلت او بدر برده. ملک را تبسم آمد و گفت:

"Lupid' fine iĝas lupo	عاقبت گرگ زاده گرگ شود
Eĉ kreskinte kun hom-grupo"	گرچه با آدمی بزرگ شود

Preskaŭ du jaroj pasis. Aro da lokaj huliganoj aliĝis al la junulo kaj faris ĵuron. En oportuna okazo li mortigis la ministron kaj liajn ambaŭ filojn kaj ŝtelis senmezuran riĉon kaj en rabistara kavo anstataŭigis sian patron kaj fariĝis ribelanto. La reĝo metis la mirfingron inter siajn dentojn kaj diris:

سالی دو برین برآمد. طایفه‌ی اوباش محلت بدو پیوستند و عقد موافقت بستند تا به وقت فرصت وزیر و هر دو پسرش را بکشت و نعمت بی‌قیاس برداشت و در مغازه‌ی دزدان بجای پدر نشست و عاصی شد. ملک دست تحیر به دندان گزیدن گرفت و گفت:

"El feraĉo bona glavo ne fareblas	شمشیر نیک از آهن بد چون کند کسی؟
el fihomo eduk' ne faras sinjoron	ناکس به تربیت نشـــود ای حکیم کس
Pluvo kies util' ne argumenteblas	باران که در لطافت طبعش خلاف نیست
Faras en dezert' vepron, en ĝarden' floron	در باغ لاله روید و در شـــوره زار خس
Sur sala tero ne kreskas hiacint'	زمـیـن شـوره سـنـبـل بـر نـیـاورد
Ne verŝu sur ĝin semon kaj laboron	در او تخم و عـمـل ضـایـع مـگـردان
Favori maliculon similas al	نکویی بـا بـدان کـردن چـنـان است
Malfavori meritplenan sinjoron	که بـد کـردن بـجـای نـیـکـمـردان

NOTO:

1- Loto estis profeto sendita al Sodomo por averti ties anojn pri iliaj malvirtoj (sodomio) sed ili ne akceptis kaj Dio detruis la urbon. Lot-edzino ne akompanis sian edzon kaj mortis dum detruo.

2- En eŭropo ili famas kiel sep dormantoj.

3- Zal kaj Rostam – patro kaj filo – estas inter la ĉefegaj herooj en la plej fama persa poemlibro epopea Ŝahname, la majstroverko de Ferdoŭsio (940–1020).

Muzika retejo de Johannes: 

http://muziko.johannes-mueller.org/kantoj/meze_de_cxio.html kanto prinatura

IREA Raportas

IREA aktivado dum la pasinta Irana jaro

En la jaro 1391, laŭ la Irana Kalendaro, IREA spertis mankon de kelkaj aktivuloj. S-roj Reza Torabi kaj Mahmud Mirbozorgi forlasis la landon kaj ilia manko estis sentita dum la jaro. Malgraŭ tio, IREA aktive agis kaj sukcesis multon fari.

Ni denove aperigis la revuon "Irana Esperantisto". Dum la jaro publikiĝis kvar numeroj de tiu ĉi revuo sur-rete, en la propra retejo de IREA, kiu estis lanĉita en la unua monato de la pasinta jaro. La adreso de la retejo estas: www.espero.ir.

Dum la jaro, ni okazigis regule "Monata Prelego" kiu dekjariĝis kaj ni festis la dekjariĝon de tiu programo. La temoj de prelegoj estis diversaj. Krome ni regule kunvenis kadre de "MoRo" programoj. Tiuj ĉi Monataj Renkontiĝoj estis ŝanco por renkonti novajn vizaĝojn kaj interbabili diversajn temojn laŭvole ne nur en Esperanto, sed ankaŭ Perse, France kaj eĉ hispane! Krom "Monata Prelego" kaj "MoRo", aliaj okazaĵoj laŭnecese estis aranĝita. Sube ni resumas la okazaĵojn kiuj komenciĝis 20-an de Marto 2012 laŭ la kristana kalendaro. Esperante ke la ĵus komencita jaro 1392 kunportos pli da aktivecoj por IREA kaj ni prosperu pli.

Dato	Dato laŭ Irana Kalen-	Evento	Klarigoj
07.03.2013	1391/12/17	Antaŭ-Noŭruza Kunveno	
26.02.2013	1391/12/08	Prelego	Temo: "Sudafriko"
04.02.2013	1391/11/16	MoRo(Monata Renkontiĝo)	Loko: Kafejo Hiĉ
24.01.2013	1391/11/05	Prelego	S-ro Mamduhi: "Eko-vilagxo: savanta solvo"
07.01.2013	1391/10/18	MoRo(Monata Renkontiĝo)	Loko: Sara Kafejo
25.12.2012	1391/10/05	Prelego	Temo: Simpleco
14.12.2012	1391/09/24	Zamenhof-Tago	
01.12.2012	1391/09/11	Prelego	Temo: La rakonto pri Keux
11.11.2012	1391/08/21	MoRo(Monata Renkontiĝo)	
28.10.2012	1391/08/07	Prelego	"Pri Lingvistiko", S-ro Omid Rohanian
07.10.2012	1391/07/16	MoRo(Monata Renkontiĝo)	
22.09.2012	1391/07/01	Monata Prelego	"Pri Ĉilio", S-ro Daniel
13.09.2012	1391/06/23	MoRo(Monata Renkontiĝo)	Vizito de S-ino Saghafian
26.08.2012	1391/06/05	Monata Prelego	Preleganto: Hamzeh Ŝafii
22.08.2012	1391/06/01	Renkonti kun Bruno Henry	Franca E-isto Vizitas IREA-oficejon
12.08.2012	1391/05/22	MoRo(Monata Renkontiĝo)	
29.07.2012	1391/05/08	Monata Prelego	Temo:"Sociologio de metroo 2"
13.07.2012	1391/04/23	Kunveno	Festo okaze de 125-jariĝo de Esperanto
24.06.2012	1391/04/04	Monata Prelego	Temo:"Sociologio de metroo"
12.06.2012	1391/03/23	MoRo	
28.05.2012	1391/03/08	Monata Prelego	Temo:"psikologio kaj mistikismo"
18.04.2012	1391/02/29	Ekskurso	Ĉitgar Parko
29.04.2012	1391/02/10	Monata Prelego	Temo: "Minimumismo en fasonado kaj arĥitekturo"
22.04.2012	1391/02/03	Kunveno	Vizito de Amelia Tomaseviĉ
09.04.2012	1391/01/21	MoRo	Monata Renkontiĝo

Raportis: H Shafii

Scienca Termino



Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB

Lingvon oni lernas por utiligi ĝin. La uzado en sciencaj kaj profesiaj kampoj tamen postulas – krom la entuziasmo – ankaŭ termin-arojn kaj fakajn esprimojn.

Antaŭ ol verki iun ajn sciencan aŭ fakan artikolon oni devas konatiĝi kun la jam ekzistantaj terminoj, fakaj esprimoj kaj parolturnoj. Nia Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, **STEB** intencas helpi ĝuste en tiu tereno.

Por koncentri la fortojn, en **STEB** ni deponas verkojn ĉefe el sfero de teknikaj sciencoj, kies produktado estas pli komplika pro la kunligitaj teknikaj ilustraĵoj, figuroj, tabeloj ktp.

Grandan parton de la biblioteka enhavo prizorgis kunlaborantoj de la Esperanto-Centro Eventoj (Szilvási László, Mészáros István, Vári Csilla, Axel Ország-Krysz, k.a), kiuj ekde la jaro 2000 retajpis aŭ skanis kaj provlegis plurcentojn de malnovaj, ne plu haveblaj libroj, revuoj, artikoloj. Grandan dankon ankaŭ al ĉiuj entuziasmaj eksteraj helpantoj, kunlaborintoj!

E@I lanĉis prikomputilan blogon



E@I denove prizorgas gravaĵon kaj lanĉis novan projekton. Kiel nomo de organizo diras (Esperanto@Interreto) ankaŭ ĉi tiu projekto ligitas al Esperanto kaj interreto, sed nun iomete alie.

Ĝis nun ni vidis bonegajn retpaĝarojn pri kaj por Esperanto (**lernu.net**, **lingvo.info**, **interkulturo.net**, ...). Nun ni povas interkonatiĝi kun retpaĝar' en Esperanto pri interreto. La unua en vico estis multlingva prikomputila vortaro Komputeko.net, nun post frazoj alvenas artikoloj. Prikomputila novaĵejo mankis sed ĉi incizuro pleniĝas. Kia estas nova blogo, kiu kuntribuadas kaj pri kio oni skribas?

Kiel blogo, ankrita en retadreso **http://blogo.ikso.net**, informas: "La paĝo estas preparata kaj konstruata." Tio diretas pri kvalito de paĝar' kaj artikoloj sed komenci oni devas. Nuntempe, laŭ informoj de informpaĝo, pri la blogo okupiĝas jenaj personoj: Peter BALÁŽ, Jevgenij GAUS, Slavik IVANOV kaj Yves NEVELSTEEN. Ĉiuj estas aktivaj membroj de E@I (kaj mi ne scias de kio aliaj ankaŭ) do skribado de artikoloj prokomputilaj ne estas oftega. Ankaŭ pro tio estas kunlaboro bonvenatega, sufiĉas sendi retpoŝton al blogo(ĉe)ikso.net kun via priskribo. Anakŭ mi uzis ĉi eblecon (vizitota paĝar', bona reklamo de E@I, kaj ĉefe ebleco disvastigi miajn grandajn konojn. Nune iomete koleras min ligileco kun Esperanto kiel lingvo (tradukoj de gravaj retpaĝaroj, programaroj, skribmanieroj deĉapelitaj literoj en diversaj operaciumoj) sed tio apartenas al Esperanto. Feliĉe progresas ankaŭ temoj pri libera programaro, Linux kaj Windows ktp.


Pri kialoj pro kreado de blogo oni skribas je informpaĝo:

En la nuntempa mondo ofte ju pli klera vi estas pri komputilaj aferoj, des pli efike vi povas funkcii en diversaj okazoj. Kaj ne eblas per unu fojo ĉion ellerni, se vi vere volas fruktodone labori kaj havi altkvalitajn rezultojn, vi devas konstante sekvi la progreson - kiuj novaj teknikoj ekzistas? kiel tiuj teknikoj povas esti utilaj al mi? kiel plej efike eblas eluzi ĉiujn ekzistantajn eblojn? - estas multe da respondindaj demandoj. Bedaŭrinde oni ne ĉiam havas sufiĉe da tempo por serĉado de tiuj respondoj. Estus bone, se ili troveblus en unu loko. Ĝuste pro tio ni kreis tiun ĉi blogon.

Vi vidas ke ekde nun ni havas plian komputilinformejon, E@I novan projekton, aŭtoroj eblecon skribi sur fama paĝaro kaj kompreneble ni partoprenas je ekesto de nova komputika komunumeto.



Tiu ĉi libro estas frukto de internacia kunlaboro en kiu mi ankaŭ partoprenis. La libro baziĝis sur romano "Kim Van Kieu" de Thanh de Tam Tai Nhan, ĉina verkisto. Nguyen Du, vjetnama poeto, faris poemaron "la rakonto pri Kjeŭ" laŭ tiu romano. En la poemaro, personaj kaj geografiaj nomoj estas ĉinaj sed la pensoj kaj sentoj estas vjetnamaj. Tiu ĉi verko estas la plej granda vjetnama literaturaĵo kun 3254 versoj. Oni povas diri ke tio estas Ŝahname de vjetnamoj. La libro estas tiom grava en la ĉiutaga vivo de vjetnamoj ke oni uzas ties personojn kiel simbolojn: bela kiel Thuy Kieu (Kjeŭ), ĵaluza kiel Hoan Thu, perfida kiel Ho Ton Hien, kaj aliaj. La poemaro estas tradukita al multaj lingvoj, eĉ kelkfoje.



Internacia grupo: Supre maldekstere, Baldur Ragnarsson; supre dekstere, Gerit Berveling; malsupre dekstere, Renato Coresetti; kaj malsupre maldekstere, Keyhan Sayadpour.


Esperantan tradukon faris Le Cao Phan. Li jam tradukis ĝin al la anglan kaj francan. Eksa prezidanto de UEA, s-ro Renato Corsetti aprobis ĝin en 2006 sed petis ties plibonigon. Le Cao Phan plibonigis kun helpo de Vjetnama Esperanto-Asocio. En la jaro 2011, estiĝis internacia laborgrupo por revizii ĝin. Tio inkluzivis fari necesajn ŝanĝojn, kaj taŭgajn rimojn kaj ritmojn, kaj finredakti ĝin. Baldur Ragnarsson, 82-jaraĝa islanda literaturisto, prezidis la grupon. Li faris la plej multan laboron kaj finredaktis la libron. 71-jaraĝa Renato Coresetti havis la duan rolon, li ankaŭ estis la kunordiganto de la grupo per e-poŝto. Gerit Berveling, 68-jaraĝa nederlandano, estis grupano sed pro malsano helpis malmulte. Mi reviziis preskaŭ kvinonon de la libro, ĝuste tiom kiom mi promesis komence. Usonano Russ Williams ne reviziis sed lia komputila program kiu kontrolis ritmojn, multe helpis. La vjetnama grupo konsistis el Nguyen Thi ngoc Lan (lingvaj aferoj), Nguyen Thi Phuong Mai (lingvaj kaj teknikaj aferoj), Nguyen Xuan Thu (administraj aferoj),

kaj Vuong Quoc Cuong (teknikaj aferoj). Ilia ĉefa tasko estis kontrolo de la esperanta traduko por esti konforma la la originalo.

La rezulto estas Esperanta traduko poezia. La nombro de silaboj kaj la lokoj de akcentoj ne estas kiel tiuj en la originalo sed estas harmoniaj. Ĝi aĉeteblas de UEA kontraŭ 18 eŭroj (sesona rabato).

Mi reviziis 500 versojn (800-1000, 1100-1300, 1600-1700, kaj 2100-2200). Jen specimeno de la libro por via plezuro.







La propono vere tuŝis lian koron,
Surĉevale li alcelis al la foro!
Sur klarakvo la ĉielo speguliĝis,
blua fumo ŝvebis, montoj sunbruliĝis.
Edzinaj ĉevaloj pro la vip-minaco
plirapidis al gepatra la palaco.
La filino tuj rakontis al patrino,
Kiel nigriĝis pro Thuc nun la destino.
Diris ŝi: "Se tiam montrus mi ĵaluzon,
Li hontus sed tio ne havus ian uzon.
Do, la kapon mi turnis indiferente,
Tamen preparante planon ruz-silente.
Ĝis Lam Tri longdaŭrus la vojaĝ' surtere,
pli rapide atingeblus ĝi surmar.
Boaton havigis mi kaj servdungitojn,
por ĉi tien tiri ŝin, la kateniton.
De miaj punoj ne restos ŝi imuna,
Ŝi iĝos freneza por sufero puna.
Unue mistraktoj ilin ja sufokos,
Post tio, ĉiuj laŭvice ilin mokos!"
Plaĉis al patrino Hoan la ruza plano,
ŝi ordonis helpi al Hoan tuj per mano.
Barko forta kontraŭ vento, kontraŭ nubo,
sur kiu Ĥujen kaj Un servis nun sen dubo.
Pri l' misio ili bone informiĝis,
Boatiri ĝis Te ĉiu plentaŭgiĝis.
De kiam Kjeŭ plu post la kurtenoj sidis,
la ĉagrenon inter sentoj ŝi dividis.
La gepatroj kline al morus' similas.
Kiel zorgi ilin, nu, tre malfacilas.
Hararo mallonga ŝultron jam atingis,
Amoĵur' iama; sorto ĝin estingis.



D-ro K. Sayadpour

IREA-Komitato Sinprezentas

Simin Emrani:



Mi naskiĝis en la jaro 1964 en Tehrano. En la jaro 1981 mi komencis lerni E-on.
Instrui E-on unuafoje mi eksperimentis pri la kurso de infanoj kiel instru-helpantino en la jaro 1986 kaj aktivis pri E-o movado divers-kampe de tiam ĝis nun. Mi klopodas pridiri la bazajn.

En la jaro 1989 aliĝis al UEA kaj tiam miaj e-kursoj okazis laŭ skeĉo-metodo en kiuj mi instruis, kaj en la jaro 1997 aliĝo al ILEI kaj ĝia sekcio en Irano -IRLEI- sed ĉi-foje kiel gvidanto de koresponda kurso tra la lando. Mi estis feliĉa, ĉar mi povis honori al miaj lernantoj inter kiuj ekz-e forte flamis la talento de Saeed Borhani en la direkto de UEA- projekto "La Lingvo de Paco". Li okupiĝis instrui E-on al la rifuĝintoj afganaj en sia urbo Mashhad kaj ankaŭ la kursojn en sia universitato. Kaj ankaŭ kelkaj aliaj.

En la jaro 2003 la sezon-revuo Esp- persa "Irana Esperantisto" ricevis ŝtatan permesilon. Mi kiel unu el redakcianoj ĉi-terene kaj nun rete kiel ĉefredaktorino respondecas.

En la jaro 2004 mi jesis kunlaboron pri la perso-Esperanta vortaro kies aŭtoro estis la majstro s-ro Aref Azari honora membro de UEA kaj honora eksprezidanto de IREA (Irana Esperanto Asocio). Post ĉi tiu parto la registaro de IREA proponis min la postenon kiel ĝenerala sekretario (2003-2009). En la jaro 2007 printempe, mi estis akceptita oficiale kiel IREano (Internacia Rajtigita Ekzamenantaro) depende al IRLEI / UEA.

Miaj proponoj estas samaj kiel miaj pasintaj agadoj pri la movado ankaŭ en nia lando.

Ahmad Reza Mamdoohi:



Mia nomo estas Ahmad Reza Mamduhi. Mi naskiĝis en 1960. Mi eklernis Esperanton 16- aŭ 17-jaraĝe ĉefe helpe de anglalingvaj memlernolibroj kaj vortaroj.

Mi estis la unua ĉefdelegito de UEA en Irano en la 1980aj jaroj. Ankaux nun mi estas ĉefdelegito de UEA en Irano. Mi estis la prezidanto de la Irana Esperanto-Asocio dum du sinsekvaj periodoj.

Mi estas membro de UEA, IREA kaj Internacia Rajtigita Ekzamenantaro (IRE). Mi verkis perslingvan lernolibron por lerni/instrui Esperanton, nomatan "La plej facila lingvo de la mondo" (en la persa: Asantarin Zabane Donja). Ĝi aperis en Tehrano per Arviĝ-eldonejo en 2005. Mia dua libro estas perslingva enciklopedieto pri Esperanto titolita "La Fenomeno Esperanto: la solvo de la internacia lingvo-problemo" (en la persa: Padideje Esperanto: rahe-halle moŝkele zabane bejnol-melali). Ĝia ĉefa kerno estas kompleta traduko de la fame konata verko de la karmemora William Auld nomata La fenomeno Esperanto, eldonita en 1987 okaze de 100-jariĝo de Esperanto sur ĉ. 100 paĝoj. Ĝiaj aldonitaj partoj ekz-e estas pri historieto de Esperanto en la mondo kaj Irano, biografieto de d-ro Zamenhof, eldiraĵoj de mondaj famuloj pri Esperanto, la ekesto kaj evoluado de planlingvoj, instruadeto de Esperanto, kaj Volapuk kaj Loglan kiel ekz-oj de antaŭ- kaj post-Esperantaj planlingvoj, ... Ĝi aperis en Tehrano per Arviĝ-eldonejo en 2006.
Mi kontribuis/as ankaŭ al Irana Esperantisto, la dulingva sezon-revuo en E-o kaj la persa. Mi ankaŭ prelegas de tempo al tempo kadre de preleg-serio organizata far d-ro Keyhan Sayadpour.

Mi kredas ke ju pli pasas la tempo, des pli bezonata farigxas Esperanto kiel internacia komun-lingvo.

Estante en cifera epoko, mi kredas ke ni bezonas agi pleje cifere en cxiu tereno: de varbado kaj instruado pere de interreto kaj eposxto, tra eldonado de diversspecaj materialoj en kaj pri nia lingvo, gxis praktika utiligado de Esperanto por diversaj celoj.

Mi kredas ke ni, la E-istaro, riĉigu Esperanton tiel multe - precipe en interreto - ke ekzistu en ĝi valoraj respondoj al onies plej-serĉataj demandoj. Tiel oni certe elspezus sufiĉe da tempo por lerni E-on. Esperante tiun tagon, ni pliigu kontribuaĵojn kvante kaj kvalite!

Saeid Nami:



Mia nomo estas Saeid Nami, Mi estas 59 jaraĝa. Tiu ĉi lingvo (Esperanto) influis al mi per konatiĝi kun la aliaj kulturoj de diversaj landoj en la mondo. Fakte Esperanto malfermis novan fenestron por mi.

Mi esperantistiĝis preskaŭ antaŭ 5 jaroj. Kompreneble mi scias ke mi estas ankoraŭ komencanto, eble tio estas unu el la kialoj ke mi estis ne tute aktiva, kaj ankaŭ alia kialo estas ke mi loĝas en urbeto Ramsaro. Tamen mi deziras kandidati por komitataneco. Interalie, nuntempe mi estas skribanto la vortaron de karmemora Azari(Esperanto-Persa) per la softvaro (Microsoft Excel). Mi esperas fini tiun frue.

Do, mi sube skribas tion kion mi klopodos realigi kaze de elektiĝo kiel komitatano:

1- Agi por progreso kaj sukceso de nia asocio.

2- Kunlabori kun aliaj komitatanoj.

3- Laŭ eble partopreni en komitat-kunsidoj.

D-ro Keyhan Sayadpour:



En 1967 mi naskiĝis en urbo Maŝhad, kie mi pasis plejmulton da mia vivo. Mi studis ĝeneralan medicinon en Maŝhad kaj diplomiĝis en 1992. Post militservo kaj la servo en foraj regionoj, mi akceptiĝis por specialista kurso pri pediatrio (infanmedicino) kaj diplomiĝis en 2000.

Mi edziĝis kun d-ino Mahsan Seifoddin. Ekde 2002 mi translokiĝis al Tehrano kaj studis subspecialistan kurson pri pediatria kardiologio(infanaj kormalsanoj). Nun mi laboras kiel universitata profesoro en Teherana Universitato de Medicinaj Sciencoj (Infana Medicina Centro).

Mi eklernis E-on en 1985. Jen resumo de miaj agadoj:

Organize: Prezidanto de IREA, Ĉefdelegito de UEA en Irano, fakdelegito de UEA, vicprezidanto de UMEA, organizanto de "esperantaj prelegoj"

Literature: Nova Talento dum belartaj konkursoj de UEA, reviziinto de la libroj "Trezoro de araba literaturo" kaj "La Rakonto pri Kieu", kolektinto de la poemaro "Versoj de Persoj", tradukanto de "Golestan"

Miaj planoj: Realigi la projekton "E-domo", reaktivigi IREJOn, daŭrigi la pasintajn aktivadojn.

Hamzeh Shafiee:



Mi esperantistiĝis antau 25 jaroj, mi nun estas 46 jaraĝa. Tio signifas ke preskaŭ duonon de mia vivo, mi pasigis kun Esperanto. Dum tiuj ĉi jaroj, mi kiel ĉiuj aliaj iranaj esperantistoj revis kaj klopodis pri la progreso de la lingvo en Irano.

Dum la pasintaj tri jaroj, la nuna komitato faris preskau nenion. Mi bedauras pro tio. Tio estas la kialo por mia kandidatiĝo por komitataneco.

Do, mi sube skribas tion kion mi klopodos realigi kaze de elektiĝo kiel komitatano:

1– Reguligi komitat-kunsidojn, au minimume virtualajn komitat-kunsidojn pere de interreto.

2- Labori por starigo de provincaj filioj, tiel ke niaj amikoj en provincoj instigu al pli da kunlaboro.

3- Agi por progreso kaj sukceso de nia asocio.

De:



Kaj …


Antaŭaj numeroj disponeblas

Nomo:
Familia Nomo:
De numero: Ĝis numero:
Adreso:

Poŝt-kodo: Telefono:
E-poŝto:

Sendu la peton al la adreso:
E-poŝto: info@espero.ir

Bonan legadon,
Irana Esperantisto



Ĝis:



Ĉe www.espero.ir troveblas.

Gazetara Komuniko: "Justa Komunikado" Islando, Rejkjaviko



Esperanto-parolantoj kampanjos dum 2013 por lingva justeco per la slogano "Justa Komunikado", kunlige kun la 98a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la prestiĝa Centro Harpa, Rejkjaviko, Islando, kun ĉirkaŭ 1.000 partoprenantoj el pli ol 50 landoj. La Kongreso havos la saman temon.

Post mallonga periodo de 125 jaroj Esperanto nun estas inter la plej uzataj 100 lingvoj, el 6.800 lingvoj parolataj en la mondo. Ĝi estas la 30a plej uzata lingvo en Vikipedio el 285 lingvoj (11a de februaro 2013). Esperanto estas uzata inter la lingvoj elektitaj de Google, Skype, Firefox, Ubuntu kaj Facebook. Google Translate, la traduka programo de Google, lastatempe aldonis la lingvon al sia prestiĝa listo de 64 lingvoj. Ankaŭ la hodiaŭaj tuŝekranaj poŝtelefonoj kapablas uzi la Esperanton.

Esperanto estas oficiale instruata en 150 universitatoj kaj aliaj institucioj de supera instruado, kaj en 600 elementaj kaj bazgradaj lernejoj en 28 landoj. Ĝi havas riĉan literaturon konsistantan el pli ol 50.000 titoloj, kun novaj eldonaĵoj aperantaj ĉiusemajne. Krom plurlandaj podkastaj radioelsendoj ekzistas ankaŭ 24-hora radiostacio kun la nomo "Muzaiko" kaj ankaŭ reta televido en Ĉinujo.

La progreso de Esperanto estis bremsata pro antaŭjuĝoj kaj pro manko de scio, ignoro de faktoj pri la temo. Adolf Hitler kaj Joseph Stalin persekutis Esperanto-parolantojn. Ambaŭ homoj malaperis, Esperanto restis, kreskis, evoluis kaj estas hodiaŭ vigle uzata por interpopola komunikado inter miloj kaj miloj da personoj en pli ol 100 landoj de la mondo.

UEA estas en konsulta partnereco kun Unesko, ĝuas oficialajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj ankaŭ kun la Konsilantaro de Eŭropo. Esperanto ebligas en interetna komunikado neŭtralan kaj justan diskutnivelon, interkompreniĝon, tiel protektante la ekzistorajtojn de minoritataj kaj indiĝenaj lingvoj, traktante ĉiujn lingvojn sur egala bazo, kaj respektante la kulturan kaj lingvan diversecojn de ties parolantoj.